

U.E.C.I. ANNO 51°



I KATOLIKA SENTO

12
rm

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 51° - 1972

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

51a Jaro

n° 8

Aŭgusto 1972

KAMALDULAJ ERMITEJOJ

Filoj de S.ta Romualdo (mortinta en 1027-a) la Kamaldulaj ermitoj observas la Regulon de S.ta Benedikto kaj siajn Normojn laŭ la reformo de la beata ermito Paŭlo Giustiniani (mortinta en 1528a). Ili vivas en ermitejoj, tio estas monaĥejoj de soleca vivo, en Italujo, Pollando, Hispanujo kaj Usono.

La ermitejo, ĉiam malproksima de lokoj loĝataj, troviĝas ĝenerale ĉe la supro de monteto aŭ de monto. Ĝi konsistas el grupo da dometoj aŭ solulaj ĉeloj, preĝejo, gastejo kaj kelkaj aliaj konstruaĵoj, ĉirkaŭataj de kampoj, legomĝardenoj kaj arbaroj.

La ermito, konsekrita ekskluzive al la serĉado de Dio en soleco kaj silento, vivas en la intimeco de sia ĉelo. Tie li preĝas, meditas konstante pri la Parolo de Dio, kulturas la sciencojn sanktajn kaj profanajn, laboras mane flegante sian ĝardenon, hakan-te ŝtipojn, zorgante pri mastrumado k.t.p. Se la obeado ne postulas la malon, la ermito eliras el sia ĉelo nur por iri al la preĝejo por la liturgiaj Diservoj, por kelkaj mallongaj promenadoj en la arbaro, aŭ por distriĝi, kio estas permesita al la ermitoj du aŭ tri



fojojn ĉiusemajne, escepte de dum Karesmo kaj Advento.

Ili tute ne kontaktas kun la mondo, ĉar estas ekskluzivitaj ĉiuj eksteraj aktivecoj de la sankta ofico. Laŭ ĝenerala regulo, la ermitoj povas skribi al sia familio kvar fojojn ĉiujare.

Laŭ la Regulo kaj la Normoj, la ermitoj fastas dum iuj periodoj de la jaro, tamen en formo tre modera; ĉiam sin detenas de manĝado de viando (kun escepto en okazo de malsano aŭ ekstrema malforteco), sin nutrante per farunaj manĝaĵoj, legomoj, fruktoj, fiŝaĵoj, ovoj kaj laktaĵoj.

La kandidatoj al la ermita kamaldula vivo devas respondi demandaron, kiu estas sendata laŭ peto, pre

zenti atestojn pri baptado kaj konfirmacio, kaj medicinan ateston pri sano. Post akcepto en la ermitejon, la kandidato sekvas en ĉio la vivon de la komunumo kiel aspiranto, dum periodo ne superanta tri monatojn. Post tiu provperiodo, li eniras kiel postulanto, kaj la periodo de postulanteco daŭras ses monatojn por la servantaj monaĥoj, kaj kvardek tagojn por la ĥoristoj kaj sacerdotoj. La novictempo antaŭanta la voton estas egala por ĉiuj kaj daŭras du jarojn.

La vivo de la kamaldulaj ermitoj evidente postulas grandan senton de kredo kaj sinofero. Sed al tiuj, kiuj havis la privilegion de tia alvokiĝo kaj ĝin sekvas grandanime kaj fidele, la Sinjoro rezervas nedireblajn pacojn kaj ĝojon, kiuj, jam en ĉi tiu vivo, superabunde kompensas ĉiujn oferojn.

++++++

Sur monteto, kie antikve kuŝis la urbo Tusculum, je 25 kilometroj malproksime de Romo, situas la ĉefa sankta ermitejo de Kamaldulanoj, kiu inspiris al samideano Luigi Minnaja la jenan poemeton:

ERMITEJAJ SONORILOJ

Sur monto kuŝas pia ermitejo.
 Sub la devizo "Preĝo kaj laboro"
 ligas Kamaldulanojn al oboe
 sankta fervoro.

Ĝuas l' ermitoj en l' intima nesto,
 ĉe l' propra eta ĉelo, en izolo,
 la varman meditado pri l' majesto
 de l' Di-parolo.

Ĉe ili staras ĉarma preĝejeto.
 Je l' Anĝeluso tra l' silento fora
 el kampanil' descendas kun kvieto
 l' ondo sonora.

Ĝi estas sono sereneco-plena,
 de l' najbarar' iĝinta jam amika,
 tra la deklivo ĝis la val' ebena
 voĉo mistika.

Mistika voĉo al la preĝ' invita;
 en la soleco pura, pacanĝelo;
 amo-kantiko supren direktita
 al la ĉielo.

Luigi Minnaja

La 34a IKUE-KONGRESO en Como okazis de la 15a ĝis la 21a de julio). Ni ne ricevis specialan raporton pri ĝi, krom la entuziasmaj impresoj de s-ino I. Galiardi, el Romo, kiu partoprenis en ĝi. Sed ankaŭ aliaj informoj konigis al ni, ke "kvankam tiu kongreso laŭ la nombro de la partoprenantoj estis modesta, tamen ĝi estis ne sensignifa, sed valora kaj ĝojiga. Precipe la ĉiutagaj diservoj estis tiel edifaj: estis kva-zaŭ impresoj kiel ĉe la "lasta vespermanĝo" tiu profundsenta kuncelebrado de sacerdotoj el diversaj landoj de okcidento kaj oriento; kaj memorinda travivaĵo la oficiala akcepto ĉe kard. Colombo".

(W. M.).

ANTAŬ DEK JAROJ, aŭguste de la 1962a, okazis en la "Centro per un Mondo Migliore" la 29a IKUE-kongreso. Plaĉas hodiaŭ al ni rememori pri tiu evento, kiu estis neforgesebla por la pli ol 300 personoj el 19 nacioj, kiuj partoprenis en ĝi. Ĉiuj kunigitaj en la vasta Centro "Por pli bona mondo", ili povis komforte profiti, por siaj asembleoj kaj kunvenoj, de la bone ekipitaj salonoj metitaj je ilia dispono; pri la kapelo, kapabla por 50% da samtempaj mesoj (tiam ankoraŭ oni ne praktikis kuncelebradojn!) pri kelkcent da dormoĉambroj kaj vastegaj manĝosalonoj; kaj samtempe ili povis fari ekskursojn al la proksima Romo kaj al la ĉirkaŭaĵoj. Aparte memorinda estis la ekskurso al Castelgandolfo, kie ili estis salutataj de papo Johano 23a en lia parolado al la pilgrimantaro, kaj kie estis benataj novaj esperantistaj flagoj. Inter la sacerdotoj ĉeestantaj ni memoras la tiaman IKUE-prezidanton, A. Beckers, la ĵus forpasintan mons. Machéner, tiam kanoniko, pastrojn Wannemakers el Nederlando, p. Cecchitelli, el Jordanio, kiu prezentis filmon pri la sankta Lando, Paruzel, Violi, Flammer...

krom multaj kaj multaj aliaj, precipe el Pollando. Kvan-
kam ne esperantisto, la direktoro de la Centro, p. Lom-
bardi, volis doni sian saluton al la ĉeestantoj. Menciin-
da ankaŭ estis la ekskurso al Asizo je la 20a de aŭgus-
to.

MONS. EDUARDO MACHEINER forlasis nin! Dio alvo-
kis lin al la eterna premio, post kiam li ĝis siaj 65 vi-
vojaroj servis per sia ne komuna talento al la religio
kaj al Esperanto. La elstara samideano, kara al la ro-
maj katolikaj esperantistoj, kiuj antaŭ 10 jaroj konis lin
simpla sacerdote, okaze de la IKUE-kongreso en Romo,
afable kaj ĝoje respondante al nia invito ankaŭ post ki-
am li estis levita al la ĉefepiskopa rango en la fama dio-
cezo de Salisburgo en Aŭstrujo, celebris por nia gru-
po la meson kun homilio en Esperanto la 5an de decem-
bro 1965a. Post kelkaj jaroj li estis oficiale komisiita
de la Roma Kongregacio pri kulto, por la plejalta revi-
zio de la tekstoj por la meso en Esperanto, necesa an-
taŭ la Sankta Sideja aprobo. Kvankam ĉi tiu laboro es-
tis kelkfoje aparte temporaba aŭ urĝa, li ĉiam afable
kaj akurate klopodis servi al la konfidita tasko. Espe-
rantisto jam de la 1924a, li estis ĉiam ne nur favoranto
kaj akcelanto, sed esperantisto perfekta kaj plejeble an-
kaŭ aktiva. Inter 1925-1930 li kunlaboris en tiama
"Mondjunularo Katolika" (MOKA), kaj ĉiam, ĝis la mor-
to, malgraŭ lia pezŝarĝa ofica tasko kiel ĉefepiskopo de
la grava diocezo, li ne forgesis pri Esperanto. Lian a-
mon al la internacia lingvo, tiel taŭga por la katolika
kredo, li volis atesti ne nur partoprenante en kelkaj ni-
aj kongresoj almenaŭ por la sankta meso, sed ankaŭ per
la verda stelo sur sia "pektorala" episkopa kruco kaj
per la simbola ponto inter la popoloj, kiun li volis en sia
episkopa blazono. Nun lia korpo pace atendas en la kri-
pto de la katedralo de Salisburgo rekuniĝon kun la ani-
mo en la ĉielo, kiam Dio revekos ĉiujn mortintojn. Ripozu
en paco, amata samideano!



KATOLIKA GEEDZIĜO kun la tuta teksto en Esperanto okazis ankaŭ dum la Universala Kongreso ĉe Portland, la 2an de aŭgusto. Oni uzis la saman tekston pretigitan de ni por la ceremonio, pri kiu ni raportis en la 7-a numero. La amerika teksto estis bele represita sur verda papero grandnombre, ĉar oni antaŭvidis, kiel fakte okazis, partoprenon de multaj kongresanoj. Geedzoj estis la italoj Ludovico Calabro kaj Giovanna Langiaru. Lastmomente aperis multaj burokrataj malhelpoj por la nupto. Sed la persisto de

s-anino Heusner sukcesis konvinki la juĝiston, kiu transsaltis ĉion kaj rajtigis la celebradon. Diservis s-anaj pastroj Sigmund Klimowicz kaj Albino Ciccanti, kun la ĉeesto de 220 esperantistoj. La rito, kiu vekis ĝojan emocion en la kongresanaro, estis ankaŭ montrita per televido je la sama tago.

ROMA IE SPERANTA VOĈO
n^o 108

KIEL NI ANONCIS en la 6a numero, ni volis daŭrigi ankaŭ en la tri someraj monatoj la esperantan diservon en S.M. Maggiore ĉiudimanĉe je la 10.30 h., kvan kam tiutempe la romaj s-anoj grandparte forestas; precipe por komplezi tiujn turistojn, kiuj pro feriaj motivoj ĝuste en tiuj monatoj povas viziti Romon. Fakte en ĉiu dimanĉo pluraj el ili povis ĝojprola meso en esperanto kaj pro la sekvanta kunveno.

POR LA MOZAIKO honore al N.S. de la Espero en Nazareto:

Antaŭa sumo:	£ 231.489
I. Galiardi (Romo)	2.000
E. Omelsky (Usono)	12.000
V. K. (Ĉeĥoslovakio)	15.000
N. N. (Romo)	20.000
C. Minnaja (Padovo)	5.000
N. Minnaja (Rho)	5.000
S. Klimowicz (Usono)	10.000

Ĝis nun entute: £ 300.489

Kun plezuro ni komunikas, ke pro interesiĝo de iu nia roma s-ano, ni povas premii laŭ peto tiujn, kiuj donacos por la mozaiko almenaŭ 1.500 lirojn, per serio de tiu filatela eldono de la Vatikana poŝtentrepreno, pri Venecio, kiu dum malmultaj tagoj elĉerpiĝis kaj fariĝis jam altvalora. Ĉar la kvanto de tiuj serioj estas malgranda, rapidu sendi vian monoferon! Validas ankoraŭ por ĉiuj, kiuj donacos 10.000 lirojn, la alia premio pri bildkarto de N.S. de la Espero kun Vatikana poŝtmarko, afrankita la saman tagon de ĝia inauguro de la papa beno.

ABONKOTIZO: It. £.: 1.000 (=Us.dol. 1,60)

Poŝtĝirkonto 3-7791 al D-ro C.C. Ferrari

aŭ 1-37638 al P. Giacinto Jacobitti

NI AVERTAS, ke la novaj abonantoj ricevos krom la numeroj de Katolika Sento aperontaj en ĉi tiu jaro, ankaŭ ĉiujn de la 1973a.

NI GRATULAS nian s-anon s-on Pasquale Puracchio, edzo de Elizabeta, tajpistino de ĉi tiu bulteno, kiu streĉe kunigante studadon al sia kutima laboro, ĵus akiris diplomon pri librotenisto.

El la Katolika Eklezio

PREZENTANTE LA VOLUMON de la konata mariologo Domenico Bertetto: "La Madonna nella parola di Paolo 6a" (La Madono en la vortoj de Paŭlo 6a) p. Luigi Ciappi kaptas la okazon por insisti pri la elstara aŭtoritato, kiun havas la papo, ec kiam li ne difinas dogmon. Jam de la komenco de la eklezio - li rimarkas -

oni kunigis en la aklamo la venkojn de Kristo, Maria kaj Petro, kiel atestas eĉ la skraposkribaĵoj, kiujn oni trovis ĉirkaŭ la tombo de Petro. La tre antikva kredo je la intimaj rilatoj inter Kristo, Mariakaj Petro en la mistero de la savo, estis konfirmita de la Patroj de la 2a Vatikana Koncilio, per la dogmakonstitucio "Lumen gentium". Sed la ĉefa merito de tiu konfirmo apartenas al papo Paŭlo 6a, kiu ne nur aprobis kaj publikis la Aktojn de la 21a ekumena koncilio, sed proklamis "Marian, Patrino de la eklezio". Li ankaŭ per multaj paroladoj, radimesaĝoj, leteroj, ilustris kaj kompletigis la koncilian doktrinon pri Maria, aldonante tiel novan brilon, en la ĉielo de la pilgrimanta eklezio, al la stelkrono, kiu ornamas la kapon de la mistera virino, kontemplata de la viziulo en la Apokalipso. Dr. Bertetto jam alifoje sintezis la pri-Marian instruadon de la lastaj papoj: Pio 11a, Pio 12a kaj Johano 23a. La nova volumo artikiĝas laŭ tri partoj: en la unua la aŭtoro parolas pri la persona devoteco de la papo al Maria; en la dua li desegnas la vivevoluon de Maria en ŝia historia realo kaj en la pieco de la fideluloj; en la tria la aŭtoro prezentas la sintezon de la doktrino de Paŭlo 6a pri Maria. Ne temas - li klarigas - pri devoteco, kiu konfesas ian sendependon de la universala elaĉeto: Maria ankaŭ estis elaĉetita, sed laŭ pli elstara maniero. Ŝi devas do esti kontemplata, amata, imitata en la lumo de la mistero de Kristo kaj de la eklezio, kies plej elektita membro ŝi estas. Ĉu traleginte la volumon, demandas al si L. Ciappi, oni povas paroli pri novaj etapoj en la papa instruado pri Maria? Unuavide ne ŝajnus tiel, ĉar la vorto de la papo ne estas tiel solena, kiel en la konstitucio "Lumen gentium", kaj kiel en la ne erareblaj difinoj "ex cathedra", kiel okazis, ekzemple, por la difino de la

senmakula koncipiĝo de Maria fare de Pio 9a, kaj de ŝia korpa ĉielenpreno, fare de Pio 12a. Kaj Paŭlo 6a kaj la 2a Vatikana Koncilio ne intencis doni novajn difinojn pri aliaj mariaj veroj: Kunelaĉeto, Universalapetro, Spirita Patrineco; kvankam multaj estis la koncernaj petoj. Troviĝis eĉ kelkaj teologoj, kiuj kontestis la doktrinan gravecon de la proklamo "Maria, Patrino de la Eklezio" ĉar ĝi estis farita nur de la papo". Sed vero kaj justeco postulas, ke en la historio de la normala instrurajto de la eklezio oni agnosku al Paŭlo 6a kiel meriton, ke li skribis gloran paĝon pri la eklezia patrineco de Maria. Mons. Gerardo Philips deklaris: "Por prezenti ĉi tiun titolon (Maria, Patrino de la eklezio) la papo ne petis sinodan dekreton: li nur uzis sian papan aŭtoritaton. Tamen, konsiderante la eksteran solenan kadron en kiu ĝi estis prezentata, oni devas agnoski, ke ĝi tute ne havas nur duarangan gravecon. Kvankam la konstitucio "Lumen gentium" parolis tiel solene pri Maria, oni devas rimarki, ke Paŭlo 6a faris novan antaŭenpaŝon. Li neniam kaŝis sian preferon por tiu titolo pri Maria; tamen li neniel klopodis, por ke la Komisiono aŭ la Asembleo akceptu ĝin. Li volis per si mem tion deklari, tiel montrante, ke la Koncilio ne signifas la finon de la ordinara papainstrurajto. Estas ĉiam utile kaj necese por la eklezio, ke la papo praktiku persone sian rajton, laŭ la mezuro kaj la maniero, kiuj montriĝas pli konvenaj. La 2a Vatikana ne aligis al oligarkio la papan monarkion. Eĉ ne niu el la du terminoj kongruas al la eklezio. La papo, plejalta paŝtisto kaj la Episkopa Kolegio devos ĉiam zorgi pri la eklezio, ĉiu laŭ sia maniero. Sed same kiel Johano 23a kaj la 2a Vatikana, ankaŭ Paŭlo 6a volis sindeteni de novaj difinoj, por favori la ekumenan agadon. Tio certe ne implicas la absolutan silenton de la instruopovo mem. Kaj aliflanke ne ekzistas kontestrajto

pri la papa instruado, pretekste ke ĝi estas nur "ordinara", ne difina aŭ ne "ex cathedra". Fakte la papo plene rajtas pri nia kredo, kiam li proponas, laŭ la tradicia senco, verojn jam difinitajn. Tio do valoras ankaŭ pri tiuj veroj, ĝis hodiaŭ ne solene difinitaj, kiuj tamen estis rivelitaj almenaŭ en la tradicio; la kunigo de Maria al mistero de la elaĉeto (kunelaĉeto) ŝia universala peranteco, ŝia eklezia patrineco. La volumo de Don Bertetto "La Madono en la vortoj de Paŭlo 6a" estas la luma pruvo de la fideleco, per kiu nia papo plenumis sian taskon: "Firmigu viajn fratojn" kiel posteulo de Petro sur la roma katedro, honore ankaŭ de la patrino de Kristo kaj de la eklezio. Vere la kredo de Paŭlo 6a je Maria estas la sama de la pratempo de Kristanismo, atestita per la famaj surmuraj grifolitajoj de la apostola tombo: "Kie Petro estas, tie ankaŭ estas Maria"!

"COMMUNICATIONES", la revuo de la papa komisiono por la revizio de la kodekso de la kanona juro donas en sia lasta numero vastan informon pri la konkludoj, koncernaj skemoj kaj leĝaj problemoj, al kiuj alvenis la enkonduka laboro plenumita de pluraj studogrupoj. La temoj rilatas la ekleziajn distriktojn (apartajn ekleziojn, provincojn kaj ekleziajn regionojn,) la apartajn konciliojn (regionajn kaj provincajn), la episkopajn konferencojn; la normojn pri eŭkaristio, ktp. Kiel sciante, post la II Vatikana aperis du kontraŭaj teorioj rilate al la episkopaj konferencoj. Kelkaj opinias, ke ili igas superflua la provincajn kaj regionajn konciliojn, pri kiuj temas la kanonoj 281a ĝis 292a. Laŭ aliaj, male, tiuj koncilioj devas aliiĝi al assembleoj, kiuj reprezentu la tutan dian popolon kun tutnacia kaj konstanta karaktero kaj kun decida povo pri la paŝtista funkciado de la diocezoj. La konkludoj de

la revizia komisiono evitis ĉiun diskutadon, sed kelkmaniere superis ĝin, ĉiam memorigante, ke de Kristokaj ne de la popolo venis la jura aŭtoritato. La novaj normoj, krom la agnosko de la ekzistorajto de la apartaj koncilioj kaj la difino de la aŭtoritatoj kompetentaj por ilin kunvoki, fiksas celebradon almenaŭ dudekjaran de regionaj kaj provincaj koncilioj; kaj indikas kiujn personojn devas esti invitataj kun decida (episkopoj) aŭ kun konsulta rajto (ĝeneralaj kaj episkopaj vikarioj; kelkaj superaj estroj de religiaj institutoj, rektoroj de katolikaj universitatoj, dekanoj de teologiaj aŭ kanonaj fakultatoj, kelkaj rektoroj de superaj seminarioj). Tiuj koncilioj havas juran kaj leĝdonan povon, sed iliaj dekretoj, por fariĝi devigaj, bezonas aprobon de la Sankta Sidejo. La komisiono por la revizio de la kanona juro donas ĉiujn detalajn proponojn. ankaŭ pri la starigo de la episkopaj konferencoj, pri iliaj specifaj celoj, pri la naturo kaj la limoj de ilia aŭtoritato, pri la ĝenerala interna kaj ekstera organizo, kaj pri la rilatoj inter si kaj kun la S. Sidejo.

KOMISIONO POR LA REVIZIO de la orientitakatolika eklezio estis starigita en Romo per papa dekreto, laŭ la linioj antaŭviditaj en la Dua Vatikana Koncilio. Multaj partoj estis jam pretigitaj pere de kvar "motuproprioj", aperintaj inter 1949a kaj 1957a (entute 1950 kanonoj koncernantaj geedziĝon, procesojn, religiĝojn, ekleziajn havaĵojn, terminologion, orientajn ritojn, ktp.) 166 kanonoj estis krome prilaboritaj, sed ne publikitaj. La nova organo anstataŭas alian, kreitan samcele la 17an de julio 1935. Jam de Johano 23a estis anoncita la apero de tiu orienta kodekso; sed pro la laboroj de la dua Vatikana Koncilio estis malintensigitaj la studoj. La komisiono forigos ĉiujn timojn, kelkfoje esprimitajn, ke la nova kanona juro de la latina eklezio

englutos la orienteklezian juron, pri kiu la koncilia dekreto "Orientalium ecclesiarum" antaŭvidis laŝan aŭtonomion. Prezidanto de la komisiono estas la hinda kardinalo Parecatil, por la kaldeaj-malabaroj, kaj Viĉprezidanto mons. Ignaco Mansourati por la patriarkato de la Siria Antiokio. Ĉiuj orientaj patriarkoj estas membroj de la komisiono, krom la Ŝtata sekretario Vil lot, kard. De Furstenberg, prefekto de la kongregacio por la orientaj eklezioj, kard. Rossi, prefekto de "Propaganda Fide", Samoré Felici kaj Willebrands. Sekretario, la jezuita patro Ivan Zuzek, rektoro de la papa orienteklezia instituto.

LA 18a ITALA EŬKARISTIA kongreso okazos en Udine de la 10a ĝis la 17a de septembro. Ne temos nur pri semajno da celebradoj, sed pri plano vigligi la tutan kristanan vivon individue kaj komunume. La preparo estis longa, ĝi daŭris almenaŭ du jarojn, intensa kaj detala. Pro tio oni esperas daŭrajn fruktojn. Al la konkludo de la imponaj solenoj donos apartan signifon la probabla ĉeesto de la papo.

LA UNUAJ TIPOGRAFOJ, kiuj venis al Italujo antaŭ 5 jarcentoj el Germanujo, kvankam kompostis la unuajn belegajn librojn per interŝanĝeblaj presliteroj, kio estis mirindaĵo en tiuj tempoj, ne sukcesis tamen vivteni sin per sia laboro. Pro tio ili skribis peticion en la 1471a al papo Siksto 4a por ricevi kanonikan prebendon, kio permesu al ili vivteni, ne povante vendi siajn librojn. Siksto 4a volonte kompleksis ilin, kaj tiel la patroj de ĉiuj italaj presistoj, Korado Sweyneheym kaj Arnoldo Pannartz, kiuj starigis la unuan tipografion, fariĝis monsinjoroj. Post jarcento papo Siksto 5a fondis en Romo la unuan Vatikanan presejon apud la fama biblioteko; sed ankaŭ ĉi tiu presejo havis malfacilan ekziston, kaj post malpli ol dudek jaroj, malgraŭ la papa

protekto, ĝi devis fermi siajn pordojn. Komposti la unuajn librojn donis malmulte da gajno. Tamen la unuaj perfektaj volumoj, kiuj estis produktitaj de la romaj pre-sejoj, sin bonege konservis, kaj ankoraŭ hodiaŭ ili ŝajnas ĵus eldonitaj: merite de la vatikana biblioteko, kiu gardis ilin zorge ĝis nun, kaj kiujn nun ĝi elmontras, kiel kontribuafon al la iniciato de UNESCO pri la internacia "Jaro por la Libro". Heredanto de la unua tipografio de Siksto 5a, kiel oni vidas en la ekspozicio, estis en la 1600a la "Presejo de la roma popolo", ĉar la papoj konfidis al la komunuma aŭtoritato (tiam simbole nomata "roma popolo") la taskon presi librojn. Ĉe la fino de la 1500a estis alvokita al Romo Paŭlo Manuzio, filo de la granda venecia tipografo, komisiita de la papoj pri iliaj eldonoj; sed ankaŭ ĉi tiu unuaranga presisto restis malmultajn jarojn en Romo, kaj, presinte belegajn librojn, reiris al Venecio, kie la vendado estis pli fruktodona. Dume la vatikana kongregacio "Por la propago de la kredo" funkciigadis sian poliglotan tipografion, ki u estas unu el la plej bone ekipitaj en la mondo.

EN LA DUA NUMERO DE "Ateismo e Dialogo", organo de la Sekretariato por ne kredantoj, troviĝas interesaj artikoloj de kard. Hoeffner, de jesuito Paul Morisset, rilatantaj Kanadon; panorama rigardo pri Ĉilio, de prof. Antonio Cruz Pacheco el Santiago; alia pri kristanismo kaj marksismo. Mons. Antonio Maŭro malfermas la bul-tonon per artikolo pri la hodiaŭa sekularigo en Italujo. Li pravas, laŭ la rezultoj de enketoj pri sekularigo, faritaj okaze de la unua nacia kunveno ĉe Nemi, ke Italujo estas ankoraŭ funde penetrita de la kristana mesaĝo; ke tridek aŭ kvardek procentoj de la loĝantaro praktikas siajn kristanajn devojn, dum laŭokaza praktiko apartenas al 70 procentoj; ke ateistoj konvinkitaj estas nur 5 procentoj; ke tamen, spite de la religia praktiko, 50 pro

centoj de la italoj ne estas profunde konsciaj pri la religia problemo, kaj pro tio, tiu rimarkinda kvanto estas tre influata de la sekularigo. Kaj tio montriĝas serioze grava precipe por la junularo, kiu estas la plej multnombra en tiu amaso.

ZORGE DE LA ITALA CENTRO por la religiaj vokiĝoj, decidita de la itala episkopa konferenco por la unueca agado favore al la vokiĝoj, aperis la unua numero de la oficiala revuo "Vocazioni", kiu celas informon, dokumentadon kaj studon. Kunlaboras en la revuo, kiu aperos kvarfoje dum la jaro, la reprezentantoj de la porvokiĝaj regionaj centroj. Ĉiu numero de la revuo, kvankam pritraktos plurajn temojn kaj problemojn, prezentos monografian aspekton. La temo de la unua numero rilatas precipe la 4an tutmondan porvokiĝan kongreson. Ĝi prezentas multajn oficialajn dokumentojn, inter kiuj ne antaŭe publikitan parton de la papa parolado al la partoprenantoj en la kongreso.

SEMINARIO POR VOKIĜO de adoltoj funkcias de 1968a en Colle Val d'Elsa, apud Sieno. Ricevas la unuan preparon por sacerdota vivo junuloj el ĉiuj italaj regionoj kiuj poste perfektigas tion aŭ en la papa tutregiona seminario de Sieno, aŭ en alia, laŭ decido de la propra episkopo. Ekde 1217a la tereno, donacita al sankta Francisko de Asizo fare de la loka komunumo, apartenis al la franciskanoj, kaj nur en 1937a aĉetis ĝin la diocezo, por konstrui tie la diritan seminarion, kiu jam komencas doni siajn fruktojn.

TIU, KIU RIGARDAS INTERNE de la baziliko S. Petro en Vatikano super la bronza statuo de Petro, alte, ĉe la kornico, vidas, en la serio de la fondintoj de religiaj familioj, la grandan marmoran grupon de S. Johano Bosco, kiu tenas per sia maldekstra brako sub sia protekto du junulojn, dum per la dekstra indikas la konfesal

taron. La statuo (preskaŭ 6 metrojn alta), skulptita de Canonica, estis tien suprenlevita en 1936a, post la enkanonigo de la fondinto de la salezanoj. La duknaboj estas la historia kaj la spirita personigo de la misio de Don Bosco, patro kaj gvidanto de junuloj: Dominiko Savio, la plejkara disĉiplo, kiu sekvis en la honoro de la altaroj la patron (12-6-1954); kaj, pli malgranda, la juna patagona indiano Zefireno Namuncurà, filo de granda "kaĉiko" (indiana ĉefo), akceptita de Don Bosco en sian instituton. La 23an de la ĵus pasinta junio Paŭlo 6a subskribis sep dekretojn rilatantajn samnombrajn beatigajn procesojn; inter ili estas la "Dia Servanto" Zefireno Namuncurà. Li naskiĝis la 26an de aŭgusto 1886a kaj mortis en Romo la 11an de majo 1905a. Ĉi tiu juna indiano, al kiu nun malfermiĝas la vojo al la "Gloro" de Bernini, jam troviĝis do en la vatikana baziliko ekde la 1936a. La informo de tiu kanonika proceso ekscitis kompreneble grandan entuziasmon en la patrujo de la juna kandidato al la altaroj: li estos la unua argentina sanktulo! Dum lia patro estis la timinda militgvidanto, la lasta kiu cedis al la argentinaj registaraj fortoj, ricevante de la respublika prezidento, anstataŭ venĝopunon, la kolonelan rangon, la filo estis delikata, humila kaj milda, nomata "la patagona lilio". Dekunujara li eniris en la salezanan kolezion "Pio 9a" de Buenos-Ajreso. Tuj li montriĝis modela lernanto, studema, gaja, fervora. En 1904a mons. Cagliero kondukis lin en Italujon, esperante, ke la ŝanĝo de la klimato influos favore lian malfortan sanon. Li havis ankaŭ la ĝojon esti akceptita en Romo de papo Pio 10a, al kiu li konfirmis sian ardan deziron fariĝi misiisto en sia lando. Sed Dio transplantis lin preskaŭ 19-jaran en la ĉielon, la 11an de majo 1905a, por ke li pli brile lumu al sia popolo kaj al la tuta eklezio. Post dudek jaroj liaj korpaj restaĵoj estis transportitaj de Romo al Argentino, triumfe akcepti

taj de aŭtoritatoj kaj popolo, kiel reveno de la plej nobla heroo en sian patrujon. Nun Zefireno ripozas en la sanktejo de Maria Helpantino ĉe Fortin Mercedes, en Rio Kolorado.

BOLADAS LA LABOROJ por pretigi en Aĉilio, apud Romo, la vilaĝon, kiun la papo volis donaci al la roma komunumo por la malriĉuloj de sia diocezo. La unuaj domoj, ĉiu apartigita per eta ĝardeno, estas jam tegmentitaj. Inĝeniero kaj realiganto de la entrepreno estas sac. Ottorino Marcolini. Oni esperas, ke somere de la 1973a cent familioj de la tiel diritaj enbarakiĝintoj povos tie loĝi. Delonge la papo esprimis tiun deziron; kaj vendante por 500 milionoj palacon apartenintan al la S. Sidejo en la Urbo, li sukcesis fine vidi la komencon de tiu sopirata entrepreno. Ne temos, laŭ la plano, pri aŭtonoma urba kvartalo. Ĝi ne havos publikajn servojn, kiel lernejojn ktp., ĝuste por eviti impreson de geto kaj por favori integriĝon en urbon.

ĈAR LIBERTEMPO ESTAS ORDINARE pormalstreĉiĝo kaj ripozo, estas admirinda la ekzemplo, kiun donas preskaŭ du mil italaj junuloj, kiuj dediĉas tion al servo de subevoluintaj popoloj, klopodante kontribui al stariĝo de pli justa mondo. Temas pri la movado "Manitese", kiu laboras en Italujo kaj ekstere por kolekti monon, kaj starigi lernejojn, hospitalojn, industriojn, kamparajn kooperativojn, preĝejojn. En Italujo, krom la tradicia agado por kolekto de papero, ĉifonoj, ferruboj k.s., ili zorgas apostolan agadon kaj komunecan studon pri sociaj kaj religiaj problemoj de la Tria Mondo, laŭ ilia devizo, kiu tekstas: "Mi estas mondcivitano".

"INTIMITA' DIVINA" (Dia intimeco) estas libro unue verkita en la itala lingvo de la karmelano p. Gabrielo de s. Maria Magdalena, koncernanta meditojn pri la spirita vivo por tuta jaro. Dum apenaŭ dekdujaro ĝi atingis jam

14 eldonojn kaj estis tradukita en 9 lingvojn: franca, hispana, germana, angla, flandra, pola, portugala, japana, kroata. La disvastigo de tiuspeca libro montras, kiom da animoj sincere dezirantaj spiritan kaj fervoran vivon, ankaŭ nuntempe ekzistas, kvankam ili estas kaŝitaj, dum nur sentigas sian voĉon kun granda bruo ribeloj kaj kontestantoj. La Sankta Spirito ĉiam havas sian rezervon da animoj soifantaj internan vivon, silenton, sopiron al la altoj, spiritan forton, aŭtentikan sindonon por la proksimularo, apostolan malfermitecon al ĉiuj necesoj de la dia popolo, preĝantaj por tiuj, kiuj ne preĝas, kuniĝantaj al Dio por altiri tiujn, kiuj de li forkuras. Ĉio ĉi tio realiĝas per la dia intimeco, kiun sankta Tereza difinis "amika trajto, per kiu animo ofte parolas kun Dio".

LIA SANKTECO DIMITRIOS 1-a, nova patriarko de Konstantinopolo, deklaris je la 5a de aŭgusto al grupo de eksterlandaj ĵurnalistoj en Istanbul, ke pri la ne ortodoksaj eklezioj, li sekvos la vojon indikitan de lia antaŭulo Atenagoro. "Ni nepre klopodos gardi la unuecon de ĉiuj ortodoksoj, kaj pere de tio, la unuecon de ĉiuj kristanoj". "La rilatoj kun la sanktega eklezio de Romo, aldonis Dimitrios 1a, estos fortikigataj kaj akcelataj; kaj ni nun pristudas la aplikendajn metodojn". La patriarko substrekis la "sincerajn" klopodojn por plena repaciĝo kun Romo. "Ni ne plu memoras la kaŭzojn, kiuj okazigis la disigon kaj kiuj ankoraŭ malhelpas la unuecon. Male ni esploras la komunajn punktojn, kiuj nin kunigas". Pri la proklamo de la granda Sankta Sinodo de ĉiuj ortodoksaj eklezioj, la unua depost la 8a jarcento ĝis nun, Dimitrios 1a respondis, ke tiu alvoko estas ankoraŭ en la prepara fazo, kaj nenion konkretan oni povas diri pri ĝiaj dato kaj loko. Ĉiukaze ĉi tiu Sinodo havos du grandajn celojn: renovigo kaj unueco; tio estas celon de unueco inter kristanoj, kion oni devas atingi,

startante de pli forta unueco en la ortodoksa eklezio".

EN LA KAPELO de la Londona flughaveno uzos la saman altaron katolikoj, anglikanoj kaj protestantoj. Prio interkonsentis kard. John Heenan, ĉefep. de Westminster, d-ro Michael Ramsey, anglikana ĉefep. de Canterbury kaj d-ro Irvonwy Morgan, prezid. de la federacia konsilio de la Libera Eklezio.

KIEL PRUVO de la senbaza tezo de la "mem nuliĝo" de la rumana greko-katolika (aŭ unuigita eklezio), la vatikana ĵurnalo "Osservatore Romano" publikis informon devenantan de nedubinda fonto. La informo rilatas la deklarojn faritajn en Bruselo de patriarko Justiniano Marina el la Rumana Ortodoksa Eklezio, kiu asertis - kiel raportas la vatikana ĵurnalo - "ke la unuigita eklezio ne estis nuligita, sed memvole ĝi sindiserigis; ke la tempo de la persekutoj kaj de malliberigoj finiĝis; ke la ekzisto de la unuigita eklezio estis grava obstaklo al reunuiĝo kun la katolika eklezio". Ĉi tiun lastan aserton - deklaras la ĵurnalo - ni ne povas konsenti. "La greka-katolika eklezio estis devige nuligita" tiel komenciĝas la rimarko, kiu daŭrigas: "La starto de tiu agado havis precizan daton: la unuan de oktobro 1948a. En tiu tago, fakte, 38 katolikaj orientritaj sacerdotoj, (el la preskaŭ du mil ekzistantaj) estis alvokitaj en Cluj por sinoda kunveno, kiu devis decidi la integriĝon de la unuigita eklezio al la ortodoksa". En la kunveno partoprenis 36; la salono estis "gardata de la policistaro". la parolado estis antaŭpretigita de la aŭtoritatoj.

EN LA ĈEFURBO de Kenjo oni havis ĵuse la unuan "Regionan Renkontiĝon de la Katolikaj Virinoj", kio ebligis kuniĝon en studo kaj preĝo al reprezentantoj de la virinaj katolikaj movadoj de kvin orientaŝafrikaj landoj: Kenjo, Tanzanio, Ugando, Malavio kaj Zambio. Ĉc-

estis ankaŭ kiel spertuloj kaj observantoj religiuloj kaj superuloj de Belgujo, Italujo, Usono, Germanujo, Britujo, Meksikio kaj Nederlando. La seminario disvolviĝis en la lokaloj pruntitaj de la Misiistinoj de la Konsolitino, iniciate de la Tutmonda Unuiĝo de la Katolikaj Virinoj en kunlaboro kun UNESCO, laŭ sia kvarjara programo. Temo ĝenerala estis: "Edukiĝo : unua paŝo por liberigo kaj progreso de la virino". En la malferma sesio la afrika mons. Maurice Otunga, ĉef ep. de Nairobi, akcentis la plej urĝajn problemojn de la afrikaj virinoj. La laboroj, brile direktitaj de s.ino Bernadette Kunambe, membro de la Tanzania parlamento, estis kun granda intereso sekvataj de ĵurnaloj kaj televido. La konkludoj eltiritaj en la renkontiĝo estis: doni pli viglan impulson al la homaj kaj mensaj eblecoj de la afrika virino; progresigo de virino helpe de virino, stimulant ŝiajn talentojn; eniĝo de virino en la vivon kaj evoluon de la komunumoj kaj de la nacio. La seminario fermiĝis oficiale per la partopreno de s.ino Onyango, membro de la Kenja parlamento. Kvankam ŝi apartenas al alia konfesio, ŝi kun ekumena sento konkludis: "Estas grave, ke ni ĉiuj, kristanaj virinoj, laboru kune, je servo de l' eklezio kaj de niaj landoj, en la sama spirito de amo kaj kredo".

SPECIALA SENDITO DE generalo Mobutu, prezid. de la Zaira respubliko (jama Kongo) vizitis la papon por la rebonigo de la rilatoj de kard. Malula, kiu pro gravaj akuzoj flanke de la respublika prezidanto estis devigita forlasi la ĉefurbon kaj iri al Romo, kie li troviĝis jam de kvin monatoj. La kardinalo ricevis ian kontumacan proceson, kaj la Zaira prezidanto uzis kontraŭ li severajn kondamnajn esprimojn. Post longa serio da intertraktadoj de la S. Sidejo kun la Zairaj reprezentantoj, la konflikto ĉesis, kaj la kardinalo havis eblecon reiri al Kinŝasa, repacigite kun Mobutu.

Kaŭzo de la kverelo estis kelkaj artikoloj, atribuitaj al la kardinalo, kiuj kritikis leĝajn dispoziciojn celantajn anstataŭigon de kristanaj nomoj per novaj kongaj nomoj.

LA KOLOMBIA HIERARKIO, disvolvante pilotan planon kiu certe vekos grandan intereson pro la rilatoj inter episkoparo kaj teologoj, organizis "nuntempigan teologian kurson por episkopoj", kiu daŭris 4 semajnojn (3a de julio - 4a de aŭgusto). El unu flanko do, 65 episkopoj, inter kiuj 37 rezidencaj, kiuj kelkmaniere revenis al lernejo; el alia flanko 14 teologoj, gvidataj de kard. Danielou, de mons. Carlo Colombo kaj mons. Eduardo Pironio, kiuj intencis dialogi por enprofundigi la komunajn teologiajn konojn. Povas ŝajni paradokse, ke respondantoj pri la eklezia instrurajto, ricevis lecionojn de sacerdotoj, kiuj ne apartenas al la hierarkio. Sed oni ne devas forgesi la diversecon de karismoj en la eklezio: kelkaj estas vokitaj regi kaj instrui la dian popolon; aliaj studadi kaj enprofundigi la teologiajn nia tempajn problemojn. Cetere inter la teologoj invititaj al Bogoto troviĝis mondkonataj nomoj, kiel Jozefo Ratzinger, Johano Alfaro kaj Jozefo Fuchs; troviĝis spertulo pri marksismo, p. Georgo Cottier; bibliistoj kiel Davido Kaplin kaj Gustavo Baena; la belga sociologo Roger Vechemans. Krom la helpepiskopo de Bogoto, mons. Alfonso Lopez Trujillo, komisiita por pritrakti teologion pri liberigo, troviĝis ankaŭ tri kolombiaj teologoj; Gerardo Avango, Alberto Giraldo, kaj Fernandez Vela-squez. 14 spertuloj intervenis por ĉia eventuala aparta konsultado. La "teologia nuntempiga kurso por episkopoj" deklaris mond. Dario Castrillon Restrepo, celis studon de malfacilaj problemoj, kiujn devas pritrakti la episkopoj ne nur pri la morala kampo, sed ankaŭ pri la kredo en la nuna mondo kaj en la eklezio. Por unuigi la kriteriojn de animzorgo kaj teologio, la kurso havis

prelegojn de teologoj kun dialogo fine de ĉiu el ili; ĉiutagan resumon kun paŝtistaj aplikoj kaj laste plenajn asembleojn por sintezoj kaj resolucioj. La programo en tenis la jenajn temojn: revelacio, historia realo kaj kredo pri la dia biblia vorto; kristologia renovigo, fundamentoj kaj celoj de la Vatikana Koncilia ekleziologio; temoj pri renovigo de la morala teologio, kun aparta pritraktado de la laŭnatura leĝo; eklezio kaj sekularaj interkontaktoj.

APERIS LA UNUA NUMERO de la nova pormisia brazila revuo, "Sem fronteiras" (sen nacilimoj) kun eldonkvanto de 30.000 ekzempleroj. "Sem fronteiras" celas esti intrumento de evangelizado, de kunlaboro inter la apostolaj fortoj kaj de revigligo de misia konscienco. "Brazilo - diras la unua redaktora artikolo - kvankam kelkloke estas misia lando, devas fariĝi, dank' al siaj mirindaj eblecoj, misiista lando".

PLI OL 1.100 ESTAS la misiistoj "Filoj de la Koro de Maria" pli konataj kiel Klaretanoj, kiuj laboras en la Latina Ameriko. Fakte, preciza celo de tiu religio estas "evangelizado de ne-kristanoj kaj de la malkristanigintaj amasoj". Kune kun la popolaj misiadoj en la landoj, kie la kristana tradicio estas pli antikva, oni uzas la plej progresintajn amaskomunikilojn kaj instruadon. La ekumena koncilio donis renovigan impulson al tiu aktiveco. Fakte, kvankam tiu kongregacio posedas preskaŭ jam jarcentan sperton pri la misia kampo, depost la Koncilio, tio estas de la 1967a, ĝi malfermis sep novajn misiojn. Samtempe ĝi reviziis si an internan vivon, por reveni al la originaj postuloj de sia celo kaj por doni al la lokaj situacioj la tutan liberecon kaj respondecon necesan. En la Latina Ameriko la Klaretanoj havas la 47 procentojn de la domoj de la tuta kongregacio kaj trionon de sia tuta anaro.

LA EKUMENA TRADUKO de la Biblio en la japananlingvon jam dum tri jaroj planita, startos en septembro. La entrepreno, kiu kostos preskaŭ 36 milionojn, estos plenumita en 1975a.

LA EKUMENA TRADUKO de la Biblio en la japananlingvon jam dum tri jaroj planita, startos en septembro. La entrepreno, kiu kostos preskaŭ 36 milionojn, estos plenumita en 1975a.

.....